

ZENIT - La mondo vidata de Romo

Kodo: ZI05090910

Dato de publikigo: 2005-09-09

La Evangelio ne estas "afero por pastroj"

Parolas bibliisto Alberto Maggi de la Ordeno de la Servistoj de Maria

MONTEFANO, vendredon, la 9-an de septembro 2005 (ZENIT.org).- Por multaj la Evangelio estas afero por pastroj, sed la Evangelio estas por ĉiuj. Alberto Maggi, osm, Direktoro de la Centro pri Bibliaj Studoj de Montefano (Bibliaj Studoj) en sia lasta libro titolita "Afero por pastroj" (Eldonejo Cittadella, 12.50 eŭroj, 160 paĝoj) prezentas proponon de kredo por ateistoj aŭ plibone por "tiuj, kiuj kredas ke ili ne kredas".

Por scii plimulte pri la afero, ZENIT volis lin intervjui.

Kial la kristana propono estas rigardata kiel io, kio koncernas nur la pastrojn?

Alberto Maggi: Kiam Jesuo instruadis, la homamasoj entuziasmiĝis aŭ koleris, sed neniam ili endormiĝis. Tiuj samaj vortoj, proponataj de la pastroj en la preĝejoj, ofte efikas kiel dormigilo. Urĝas demandi de si mem kial!

La evangelia mesaĝo ne estas doktrino, sed viva sperto, kaj kiel tia ĝi devas esti transdonata: unue venas la vivo kaj poste ĝia formulado, unue la praktiko de la Evangelio kaj poste la katekizado.

Bedaŭrinde, ofte la Evangelio estas reduktita al simpla katekiza formulo sen iu vivo kiu konfirmu ĝian validecon, kun la risko, ke la vortoj mem de Jesuo perdas vivantecon. Tiamaniere tiu, kiu estus devinta esti la adrenalino de la homaro, estas malaltigata al "opio de la popoloj", kaj la feliĉo, al kiu aspiras la homaro, estas formetata al la etera transmondo.

Ĉu oni parolis pri "afero por pastroj" ankaŭ en la antikveco?

Alberto Maggi: La Evangelio komencis perdi sian efikecon kiam kristanismo, el persekutata kredo, fariĝis altrudita religio. Tutaj popoloj trovis sin kristanaj en la daŭro de unu tago ĉar iliaj reĝoj - pro politika intereso - decidis fariĝi kristanaj.

Tiu, kiu estis propono de pleneco de vivo, transformiĝis al devo sen alternativo: ekster la Eklezio – tiel oni instruadis ĝis la dua Vatikana Koncilio – ne ekzistis savo! Kaj tiel kreskis sennombraj aroj da kristanoj trude varbitaj kaj sen iu ajn entuziasmo.

Por regi kaj kontroli ĉi tiujn homamasojn la eklezioj, el dinamsimaj komunumoj animataj de la Spirito, iom post iom transformiĝis al rigidaj institucioj reguligitaj de la leĝoj, sed bonsance laŭlonge de la jarcentoj ĉiam estis komunumoj aŭ unuopaj kredantoj, kiuj malkovris kaj travivis la belecon kaj la plenecon de la evangelia mesaĝo kaj ĝin transdonis ĝis ni... Estas danke al la diversaj sankta Francisko el Asizo kaj Tereza el Avilo, ke la Evangelio restis la bona sciigo por ĉiuj.

La via estas propono de kredo por tiuj, kiuj kredas, ke ili ne kredas. Kion vi volus sugesti al ili?

Alberto Maggi: La akcepto de la mesaĝo de Jesuo forprenas nenion de la homo, ne malgrandigas lin, sed ĝi ebligas atingi, jam en ĉi tiu surtera ekzisto, iun dimension de vivo definitiva kaj pro tio dia.

La granda plimulto el la nekredantoj rifuzas la dion de la religio, frukton de la projekcio de la frustracioj, de la timoj kaj de la ambicioj de la homoj. Kiam la nekredanto renkontas la Patron de Jesuo, iun Dion kiun ne petas oferojn sed li mem sin oferdonas al la homo por transdoni al li sian tutan plenecon de vivo, iun Patron kiu ne rigardas al la meritoj de la homoj sed al iliaj bezonoj, iun Sinjoron kiu ne estas bona, sed ekskluzive bona, kaj deziras komuniki al la homoj sian tutan amon... estas malfacile, ke li estu rifuzata.

Al ĉiuj, kredantoj kaj nekredantoj, la Evangelio proponas orienti malsimile sian ekziston, metante la bonon de la aliulo je la unua loko en la valoroj de sia vivo. Kiam estas ĉi tiu sanĝo, oni spertas, ke ĉiuj vortoj de Jesuo estas aŭtentikaj kaj veraj, kaj ke kiam oni zorgas pri la aliaj oni ebligas al la Patro, ke li zorgu pri siaj filoj.

La Evangelio estas, laŭ kelkaj, farita nur el formuloj kaj ordonoj, sed ne Parolo de Vivo. Kion fari, por havigi kontraŭrimedon al tio?

Alberto Maggi: "Evangelio" signifas "bona sciigo", kaj ĉi tiu bona sciigo estis, ke por la unua fojo en la historio de la religioj oni prezentis Dion, kiu ne premiis la bonulojn kaj punis la malbonulojn, sed kiu al ĉiuj, sendistinge, komunikis sian senfinan amon.

Kun Jesuo, "Dio kun ni", la homo non devas plu serĉi Dion, sed akcepti lin. Kiam tio okazas, la homo spertas Patron, kiu ne amas la homojn ĉar ili estas bonaj, sed ĉar li estas "la bonulo"; Dion, kiu ekskludas neniun kaj ne lasas, ke sia amo estu kondiĉita de la

respondoj kaj de la sinteno de la homoj; Sinjoron, kiuj ne petas subulojn obeemajn al liaj nesanĝeblaj leĝoj, sed filojn similajn al lia kreskanta kaj dinamisma amo.

Se tio estas konsiderata, la Evangelio denove fariĝas la pano, pri kiu la homaro malsatas, kaj la homoj transiras de la kredo je Dio al la sperto pri li kiel Patro zorgema kaj atenta ankaŭ pri la plej malgrandaj detaloj de la ekzisto, kaj la vivo estas tute transformita.